

## Saluton , estimataj IKEF- landfilioj kaj membroj!

Hodiaŭ estas la dudek-sesa dato de decembro en la jaro du mil dudeka ( La Kvara Komuna Konferenco de IKEF ), por pli bone labori en venonta jaro(du mil dudek-unua jaro), nun mi resumas nian laboron de pasinta jaro.

Rerigardinte la pasintan jaron , nia IKEF estis aktiva je jenaj faktoj:

1, Dume naskiĝis kvar landfilioj (Irano,Nordameriko,Tanzanio kaj Pollando). Tiel nia landfilio atingis dek ok membrojn kaj unuafoje nia landfilio aperis en Nordameriko kaj Eŭropo, kie iam aktivis nia IKEF. Ĝuste ĝis la oficiala fondiĝo de IKEF-Pollando la dek kvinan daton de decembro en la jaro du mil dudeka. En du mil dek-naŭa jaro la naskiĝtago de Ludoviko Lazaro Zamenhof, nia landfilio jam ekzistas en ĉiuj kontinentoj tra la tuta mondo. Paŝon post paŝo ni marŝas al nia celo por konstrui la mondan Esperanto-aplikan sistemon kadre de IKEF.

2, La Tria Komuna Konferenco de IKEF sukcese okazis dum la dek-tria dato ĝis dek-sesa dato de aŭgusto en Ulanbatoro de Mongolio, danke al IKEF-mongolio kaj decidis ke La Kvara Komuna Konferenco de IKEF okazos dum Septembro en la jaro du mil dudeka en Kioto de Japanio. Ankaŭ IKEF-estraro konsideris kelkajn landkandidatojn por venonta Komuna Konferenco de IKEF (KK). Strategie, KK okazos ĉiujare en malsama lando kondiĉe kie ekzistas landfilio de IKEF. Jaron post jaro KK fariĝos granda foiro de la monda Esperanto-aplikantaro.

3, La vojaĝservo estas grava tasko de Esperanto-aplikado. En la jaro du mil dek naŭa nome de IKEF-Ĉinio aktivulo Grando Zhang Wei. organizis ĉinan Esperanto-karavanon trifoje al Nordkoreio. Tio donis al IKEF prestiĝon tra Esperantujo. Ankaŭ IKEF-Ĉinio donis al aktivaj IKEF-anoj barata, korea, konga kaj pollanda la komercivojaĝan servon. Similaj aranĝoj ankaŭ okazis en Koreio, Japanio, Bulgario kaj aliaj landoj. Tio donis al IKEF prestiĝon kaj aktivecon. Ni alvokas al ĉiuj IKEFanoj utiligi sian komercivojaĝon kontakti lokajn IKEFanojn, aŭ pere de lokaj IKEFanoj kontakti lokajn entreprenojn, montrante utilecon de Esperanto.

4, Profesia E-instruo estas farinda tasko de IKEF. IKEF-Ĉinio jam organizis tian instruadon por pli ol dek jaroj gvidite de profesoro Ludoviko Zhao Chenghua, vicprezidanto de IKEF, kaj fine de la jaro du mil dek naŭa la nova Voĉatkurso de Esperanto-komerca

konversacio jam varbis pli ol ducent kursanojn. Tio faras amasbazon por nia aranĝo kadre de IKEF. Ni alvokas al aliaj landfilioj lerni de la ĉina filio por kultivi sian amaskampon.

5, Landfilio-Nordameriko partoprenis UK rete en aŭgusto kaj precipe John Huang de prezidanto de Landfilio-Nordameriko faris prelegon je la scienca kafejo de la UK en la jaro du mil dudeka. La relativa papero “La Valoroj de Esperanto en Ŝanĝiganta Mondo” estis eldonita en la jarlibro de la internacia kongresa universitato ĉi jare. John Huang enkondukis pri IKEF en la prelego.

6, IKEF organizis pli ol dek interretajn kunvenojn, pli ol cent IKEF-membroj partoprenis, por fari bazon de la kvara komuna konferenco de IKEF.

7, Por pli bone konstrui la mondan Esperanto-aplikan sistemon kadre de IKEF kaj altigi al IKEF prestiĝon tra la tuta mondo, Ĉielismo WANG Tianyi Prezidanto de IKEF kun Longarko de prezidanto de Ĉina landfilio partoprenis internacian industrian konferencon de Ĉinio je la dudeka dato de oktobro en la jaro du mil dudeka kaj puŝigas evoluon de Esperanto-ekonomio.

Supero estas nia sukceso, kompreneble ni ankaŭ havas multajn mankojn. Ekzemple: nia nivelo de Esperanto ankaŭ bezonas pluan altegon, ni ankaŭ devas rapidigi paŝon de Esperanto-apliko. Venontjare ni certe venkos mankojn. Por senĉese altigi nivelon de Esperanto kaj aplikoj ni diligente laboras.

La jaro du mil dudek unua komenciĝos kun la espero. Ni deziras al IKEF-landfilioj kaj IKEFanoj novan energion kaj dudekoblan prosperon en la jaro du mil dudek unua!

Dankon!

Ludoviko Zhao Chenghua, vicprezidanto de IKEF